N-ro 3/2005 (175) Prosinec/decembro 2005

La semajno de Homaj Rajtoj kaj de Esperanto
de la 10-a ĝis la 18-a de decembro 2005

Laŭ la decido de la estraro de UEA esperantistoj de la tuta mondo aktiviĝu dum tiu ĉi semajno, ĉar la 10-a de decembro estas la Tago de Homaj Rajtoj kaj la 15-a de decembro – la naskiĝtago de D-ro Zamenhof – estas festata kiel la Tago de la Esperanta Libro.
La 12-an de decembro je la 17^{00} horo okazos en la Muzeo de la Ĉefurbo Prago, Na Poříčí 1554/52, **Kristnaska vespero** kun la kristnaskaj poeziaĵoj de la ĉeĥa poetino Věra Ludíková. Ŝiajn poemojn deklamos en la ĉeĥa lingvo Radovan Lukavský, en esperanto Josef Vích. Amasa vizito de tiu ĉi aranĝo fare de esperantistoj estas dezirinda.
La 15-an de decembro de la 14-a ĝis la 17-a horo en la kunvenejo Ve Smečkách n-ro 25, Praha 1, nia klubo jam tradicie festos la **Zamenhof-tagon** kaj samokaze la **Kristnaskan vesperon** kun prelegoj, kantado de kristnaskaj kantoj, manĝado kaj trinkado. Ĉiuj estas tre bonvenaj.

Al ĉiuj niaj membroj kaj al ĉiuj bonvolaj homoj ni deziras belajn Kristnaskajn festojn kaj multe da sano kaj feliĉo en la paca jaro 2006. La Komitato de la Klubo.

Týden Lidských práv a esperanta
od 10. do 18. prosince 2005

Předsednictvo Světového svazu esperantistů vyzvalo esperantisty celého světa, aby v týdnu od 10. do 18. prosince 2005 zaktivizovali svou činnost, a to na základě toho, že 10. prosinec je Dnem lidských práv a 15. prosinec – den narození tvůrce esperanta Dr. Zamenhofa – je slaven jak Den esperantské knihy.
Dne 12. prosince se od 17^{00} hod. zúčastníme **Vánočního večera** české básnířky paní Věry Ludíkové v Muzeu hlavního města Prahy, Na Poříčí, kde její vánoční poezii v češtině přednese Radovan Lukavský a v esperantu Josef Vích. Srdečně zveme všechny přátele.
Ve čtvrtek dne **15. prosince** od 14. do 17. hodin v klubovně Ve Smečkách č. 25, Praha 1, náš klub už tradičně oslaví **Zamenhofův den** a zároveň i **Vánoční večer** s přednáškami a zpěvem koled v esperantu a s vánočním osvěžením. Těšíme se na hojnou účast členů klubu.

Všem našim členům i všem lidem dobré vůle přejeme hezké vánoční svátky a hodně zdraví a štěstí v mírovém roce 2006. Výbor klubu.

Božena Němcová

Saĝa oraĵisto

Radoš estis dek ok jarojn aĝa, kiam liaj gepatroj mortis. Nun restis al li nenio alia, ol iri labori. Do li ekpensis: kiam mi devas labori, mi iros en grandan urbon jak tie mi laborigos min; mi ja scipovas labori. Li kunprenis siajn aĵojn kaj iris. Nemalproksime de la urbo salutis lin la Saĝo kun la Prudento. Ekde tiu momento li laŭdire estis tiom saĝa kaj prudenta, kvazaŭ en altaj lernejoj li estus edukita, kaj ĉio, kion li en la manojn prenis, nepre estis bone farita.

Radoš promenas tra belaj stratoj, kaj jen ekplaĉis al li belega kaj pompa butiko oraĵista, en kiu sidas laborante multaj metilaboristoj. Tio tre ekplaĉis al li kaj denove li ekpensis, ke li ne serĉos laboron, sed ke li lernos fariĝi oraĵisto. Senpripense li eniras en la ejon, ĝentile li salutas la majstron kaj petas lin, ke li por metilernanto akceptu lin.

„Nu, mi akceptos vin," oponis la majstro, „sed vi jam estas iom tro aĝa por esti metilernanto; antaŭ o lvi ellernos, vi estos preskaŭ dudekses-jara. Aparte de tio, ke vi lernos unu jaron dum unu jaro?"

„Memkompreneble, majstro, mi havas neniun monon por pagi por la lernado. Sed vi certe estos kontenta pri mi kaj mi eĉ momenton ne vanigos," diris Radoš.

„Restu do," diris la majstro, destinis al li lokon por liaj aĵoj kaj por Kuldo. Post kiam Radoš tion ordigis, tuj li emis fari la atribuitan laboron. Komence la aliaj laboristoj mokis lin, ke li estas mallerta Levanto, sed baldaŭ ili eksilentis; kion Radoš prenis en la manon, tion li sukcese faris, kaj kion la aliaj du jarojn lernis, tion li scipovis post unu semajno. Post du semajnoj li jam faris ringojn, orelringojn kaj braceletojn tiom belajn, ke estis plezure ilin rigardi.

„Mi ne scias," diris la majstro al sia edzino, „kion mi pensu pri Radoš, ĉar li jam estas ellerninta kaj de mi nur saĝon tiras, aŭ li estas naskita sur feliĉa planedo?"

„Ne , tion ne kredu, ke li mistifikas vin, li estas la viva vero mem," defendis la majstro-edzino la metilernanton, kiu estis al ŝi je dispono.

Post kvar semajnoj li ricevis ellern-ateston kaj la mastro tre ŝatis lin. Foje li promenis kun la majstro tra la urbo, kiu estis granda kaj en kiu rezidis reĝo. Jen li vidas sur pordego kraton surmetitan sur stango. Li do demandis la majstron, kion tio signifas, kaj la majstro komencis jene rakonti:

„Nia reĝo havs unusolan filinon, virgulinon tiel belan, ke oni malproksime serĉus similan. Sed ekde sia dudeka jaro ŝi ne parolas, sed ĉu pro dia decido aŭ pro ŝia propra volo, tion neniu longe povis malkovri. Kiom da kuracistoj kaj aliaj kleraj viroj estis ĉi tie, sed neniu paroli emigis ŝin. Ŝi legas, rajdas, promenas, scipovas bele brodi, sed ĉion ĉi ŝi faras senparole. Antaŭ tri jaroj troviĝis ĉi tie saĝa profetino, kiu diris, ke la reĝidino Liběna estas sub sorĉa potenco kaj tio tiel longe daŭros, ĝis kiam aperus junulo, kiu devigus ŝin paroli. Tiam la reĝo ordonis, ke se iu lian filinon paroligus, al tiu li edzinigus ŝin, ĉu li estas pleba aŭ nobela. Tiam venis diversaj homoj, kiuj sin ĉe la reĝo anoncis kaj la reĝidinon ĝenis, sed ne resanigis. La reĝo tre ĉagreniĝis pro tio kaj la reĝidino ankoraŭ pli, tial ŝi foriris en siajn ĉambrojn kaj eĉ eliri el ili ŝi ne volis. Laŭdire tri tagojn li genuis antaŭ Liběna kaj senĉese petis, ke ŝi nur ununuran vorton diru al li, sed ŝi eĉ ne moviĝis, kaj tial la trian tagon li perdis la kapon, kiu estas ĉi tie por averto eksponata. Ekde tiu tempo laŭdire neniu anoncas sin, kaj jam la kvina jaro proksimiĝas, kiam la reĝidino ne parolas."

Radoš tre ekmiris pri tio kaj tre kompatis la belegan Liběna. Li jam estis unu jaron ĉe sia majstro, kiu zorgis pri li kiel pri propraj okuloj kaj jam kun sia edzino interkonsiliĝis, ke se Radoš restos ĉiam tiel bonkonduta knabo, ili akceptos lin kiel propran filon, ne havante aliajn infanojn.

Praha-ek-2005-03-03

Iun tagon venis reĝa kortegano kaj mendis ĉe la majstro por la reĝidino juvelojn. Ili devis esti tiel belegaj, kiel ĝis nun neniu vidis, kaj el la plej multekostaj gemoj. La majstro tion promesis, sed post kiam la kučero foriris, li gratis sin malantaŭ la oreloj kaj ne sciis, kiel tion aranĝi kaj al kiu ordoni la laboron.

„Kio okazis al vi, majstro, ke vi estas tiom trista?“ demandis Radoš.

La majstro konfidence diris al li ĉion.

„Ne maluju, majstro, tiun laboron transprenos mi kaj la reĝo certe estos kontenta pri mi.“

„Kaj ĉu vi opinias, Radoš, ke vi kapablos fari la laboron, kiun eĉ mi mem ne kuraĝas fari? Ĉu mi povas doni al vi tiom da oro kaj multekostaj juveloj por fuŝi ilin?“

„Donu al mi do ion fari prove, kaj se tio plaĉos al vi, poste mi faros ankaŭ la aliajn.“

La majstro estis kontenta, li donis oron kaj gemon, kaj Radoš tuj eklaboris. Sed kiel miris la maljuna oraĵisto, kiam Radoš alportis al li pretan ringon. Al tiu egalis neniu alia en la tuta butiko. Plezure la majstro donis oron kaj diamantojn laŭ la bezono, por ke li faru ankaŭ la ceterajn objektojn al la juveloj apartenantajn. Radoš stress ĉion kiel eble plej bone plenumi, kaj kiam li estis preta, li faris ankaŭ argentan juvelujon kaj ĉion en ĝin kunmetinte, li alportis ĝin al la majstro.

Post kiam la majstro rigardis la juvelojn, li ĉirkaŭbrakis Radoš-on kaj diris: „Knabo, ekde hodiaŭ la majstro estas vi, mi ne plu povas lernigi vin, ĉar vi longe devancis min.“

Sed ĝi estis tia laboraĵo, kiun apenaŭ iu scipovis. Oni ne sciis, kion pli frue admiri, ĉu la reĝan diademmon, aŭ la subtilan kolieron, aŭ la sublimajn orelringojn, braceletojn kaj aliajn etaĵojn. Tie estis fadenetoj kvazaŭ de araneoj ŝpinitaj kaj folioj kaj floretoj kvazaŭ el la tero kreskintaj.

„Knabo, kiel mi rekompencu vin por tio?“ demandis la majstro, tuta feliĉa, sian metilaboriston.

„Neniel, nur permesu al mi, ke mi mem rajtu tion al la reĝo forporti.“

Tion la majstro al li volonte faris kaj Radoš iris en la reĝan kastelon. Kiam li anoncis, ke li portas al la reĝo la menditajn juvelojn, li tuj estis antaŭ la rezón allasita. Profunde li riverencis kaj al la reĝo la argentan ufon donis. Apenaŭ la reĝo kovrilon malfermis, sereniĝis lia vizaĝo kaj kun rimarkebla plaĉo li rigardis la juvelojn.

„Ĉu vi ne povus diri al mi, junulo, kiu tion ĉi faris?“ demandis la reĝo afable.

„Mi mem, plej moŝta reĝo!“ respondis Radoš.

„Aj, junulo, do vi estas tiel lerta artisto, kiun mi ĝis nun ne konis; ĉu mi povas al vi ian gracon fari, do postulu,“ proponis sin la reĝo al Radoš, kiu pro ĝojo preskaŭ ploris.

„Plej moŝta reĝo! Mi aŭdis, ke ĉiu povas veni al reĝidino, kiu volas provi redoni al ŝi la parolkapablon. Tion ankaŭ mi volus provi kaj tial mi petus vian reĝan molton, ke mi iri al ŝi rajtu.“ Tiel Radoš petis la reĝon, kun timo atendante la respondon.

„Certe, junulo, ke vi rajtas al ŝi iri kaj resanigi ŝin provi, sed mi bedaŭrus, se vi ne sukcesus; vi certe scias, kio vin poste atendas

„Mi scias, plej moŝta reĝo, kaj mi volonte al la morto submetiĝus, se mi tion ne kapablos.“ La reĝo venigis sian korteganon kaj ordonis, ke li gvidu Radoš-on al la reĝino en ŝian ĉambron kaj solan lin tie lasu; sed la kortegano komprenis la sekretan signon, ke li aŭskultu, kio okazos. La kortegano gvidis lin tra multaj ĉambroj ĝis salono, kie ne estis alie ol en paradizo; da floroj, arboj, tapetoj, oro, arĝento, tapiŝoj, ĉio multe. Kaj tio ĉio estis surverŝita de malhela sunlumo, kiu tra kolorigitaj fenestroj buntajn ombrojn sur blankan marmoran plankon metis. En la fronto de la salonego pendis de plafond malsupren pezaj kurtenoj, kiujn la kortegano leĝerete malfermis, kaj al Radoš li permane signis, ke li venu.

Ĝi estis malgranda ĉambreto, lukse, sed tiel komforte kaj gracie aranĝita; ke al oni estis iel agrable, kiam oni en ĝin enpaŝis. Sed la plej bela estis la reĝidino Liběna. Ŝi sidis ĉe fenestro kaj per oro brodis.

Eĉ la vejneto en la ĉarma vizaĝo ne moviĝis, kiam Radoš eniris, eĉ la pupilo por momento ne turiniĝis al li; ŝi ŝajnis esti sen vivo kiel la bildo, kiu e nora kadro sur muro pendis kaj ŝin kiel etan infanon prezentis. Per klara okulo ŝin rigardante, Radoš klinis sin antaŭ la reĝidino kaj starigis sin antaŭ ŝian bildon dirante: „Decidu vi, bildo bela, la kruelan batalon, kiu en la kastelo estas; lignoskulptisto faris pupon, tajloro kudris robon por ŝi, sed paroligistino donis al ŝi parolkapablon. Al kiu nun la pupo apartenas?“

„Al kiu ŝi apartenus, ol la la paroligisto, kiu donis al ŝi la parolon?“ ekparolis la reĝidino kaj silente kudris plu.

Radoš eliris riverencante el la ĉambro, sed la kortegano envieme sciigis la reĝon, ke la reĝidino eĉ per unu vorto ne respondis, kaj Radoš devis en la kastelo resti, kie li aliel bone fartis. La majstro ne sciis, kion opinii, kiam servisto alportis al li monon por la juveloj kaj transdonis sciigon, ke la metilaboristo revenos nur post la tria tago.

La sekvan tagon Radoš estis denove gvidita en la ĉambron de la reĝidino kaj kiel en la antaŭa tago li starigis sin antaŭ la bildon kaj demandis: „Decidu vi, bildo bela, la kruelan batalon, kiu en la kastelo estas. Skulptisto faris pupon, tajloro kudris por ŝi robon, sed paroligisto donis al ŝi parolkapablon. Nun volas havi ŝin ĉiu, al kiu ŝi apartenas?“

„Hieraŭ mi diris al vi, ke ŝi apartenas al la paroligisto,“ respondis ree la reĝidino.

La kortegano kiu aŭskultis, ne deziris al Radoš, ke i povus esti reĝo, kaj denove diris al la reĝo, ke la reĝidino ne parolis. Denove li estis en la kastelo retenita. Sed la trian tagon iris aŭskulti la reĝo mem. Radoš eniris en la ĉambron kaj denove li demandis la bildon: „Decidu vi, bildo bela, la kruela batalon, kiu pro pupo en tiu ĉi kastelo estas. Skulptisto ŝin faris, tajloro robon kudris por ŝi, sed paroligisto donis al ŝi parolkapablon; al kiu ŝi nun apartenas?“

„Jam dufoje mi diris al vi, ke al la paroligisto, kial vi ne kontentiĝas pri tio?“ diris Liběna kaj leviĝis de la tableto. Jen ensaltis la reĝo en la ĉambron kaj plorante kisis la filinon. Post tio li prenis la manon de Radoš kaj diris: „Junulo, vi faris min feliĉa patro kaj ĉiun ĝojon vi redonis al mi, fariĝu do mia filo kaj reĝo, ĉar mi agnoskas, ke vi estas pli saĝa ol aliaj.“

„Mia plej gracoplena sinjoro,“ respondis Radoš, „kiel mi povus esti reĝo, mi ja estas de malalta deveno, mi ne scias, kiel konduti ĉe la kortego, kaj la belega reĝidino min por sia edzo apenaŭ volos havi?“

„Vi min per via saĝo el la sorĉkatenoj liberigis kaj mi nenium alian por edzo volas, nur vin,“ diris Liběna kaj proponis al Radoš la manon, kiun li arde kisis.

Tuj tra la urbo disfamiĝis, ke la reĝidino estas resanigita kaj ŝia liberiginto estas malnobela oraĵista metilaboristo. Tiam rapidis la maljuna majstro en la kastelon por konvinkiĝi, ĉu estas tiel, kaj kiam Radoš lin kun ĝojo al la reĝo kiel sian bonan majstron prezentis, la maljunulo dankis al Dio, ke tian metilernanton li sendis al li.

Post ia tempo estis nuptofesto kaj la reĝa fianĉino brilis en la juveloj, kiujn por ŝi la fianĉo proprašme faris. Radoš regis saĝe, kie antaŭ li neniu reĝo, kaj la popolo preĝis por li ellitiĝante – enlitaiĝante. Li havis kelkajn filojn kaj ĉiu devis junaĝe ion ellerni kaj neniu ricevis titolon senmerite. Ĉu ankaŭ la Saĝo kaj la Prudento salutis ilin, tion oni ne scias.

(Tradukis Jiří Patera)

Ora medalo honore al membriĝo de Ĉeĥio al EU

En majo la Ĉeĥa monerfarejo en Jablonec n. N. emisiis kvindekon da memormedaloj okaze de la unua datreveno de la membriĝo de Ĉeĥa respubliko al EU. Ĉiu medalo estis farita el 1 kg da pura oro, ĝi havis diametron de 8,5 cm kaj dikecon de 11 mm. Unu medalo kostis duonmilionon da ĉeĥaj kronoj kaj ĉiuj medaloj estis tuj disvenditaj. La arta prilaboro de la medalo estas verko de nia samideano, akademia skulptisto prof. Jiří Harcuba. La aversa flanko de la medalo prezentas la stiligitan vizaĝon de diino Eŭropa kun tiliaj branĉetoj, kiuj estas la ĉeĥa nacia simbolo, sur la reverso estas la majuskloj EU kaj 25 steloj, kio estas la nombro de nunaj membroj de EU.

Praha-ek-2005-03-05

Zdenka Bergrová

Infanoj de la respubliko

(Daŭrigo)

Panjo travivis jam dum la unua mondmilito starvicojn por pano, en kiuj virinoj svenis pro malsato kaj senfortiĝo. Dum la ŝtatrenverso panjo kantis tutan konton kun Karel Hašler sub florkronita tilio en Venceslaa placo. Unuafoje ŝi venis hejmen nur antaŭmatene kaj estis riproĉregalita de sia panjo, sed ne tro, ĉiuj sciis, kion oni festas. Hejme la avino estis sola kaj nur pro tio, ke la diboĉuloj, kiuj ne havis ŝlosilojn, ne restu sur la strato.

Panjo ne havis elstaran voĉon, sed ŝi ŝatis kanti. Antaŭ la invento kaj ankoraŭ kelkan tempon antaŭ la ĝenerala disvastiĝo de la radio homoj pli multe kantis, nuntempe kantado el loĝejoj ne aŭdiĝas. Ŝi kantis popolajn kaj patriotajn kanzonojn, inter ili ankaŭ „Lumu al mi suno ora, por el patruj ´ lasta paŝ´“ pri la adiaŭo fare de Johano Amoso Komenio el Ĉeĥlando, kiun li devis forlasi pro sia bohemifrata kredo.

„Panjo, kio estas filmi?“ mi demandis foje, por konvinkiĝi, ke filmi estas la samo kiel rememori.

„Kion vi pensas per tio?“ kontraŭis panjo.

„Nu ja, ĉar mi devas adiaŭi, vin ja filmi estos ĉiam!“

Panjo ekridis kaj klarigis:

„Via fil´ - mi estos ĉiam…“

La ĉeĥa lingvo iam havas ĉe muziko apartan intonacion.

Panjo naskiĝis en la jaro 1901. La avo estis stukisto, tiam tio estis lukra profesio, sed bedaŭrinde li troĝuis gastejojn. Ĉe Přemysl, Ĉe Neklan… Kiam li havis bonan humoron, li diradis al la infanoj, kiuj serĉis lin en gastejoj:

„Mi scias, se mi ne estus trinkanta, vi povus surhavi silkon kaj veluron.“

Certe… La stukistoj estis iom kiel skulptistoj. Ili ornamis ankaŭ en novaj burĝaj domoj, ne nur nobelaj placoj, la altajn plafonojn aŭ eĉ vandojn per filigranaj reliefoj el gipso, per ŝtukaĵoj. Ili havis por tio formojn, sed multo dependis de la artista kapablo de la stukisto.

Gastejoj estis malbeno de la malnova Vyšehrad. La avo ĉesis viziti ilin nur dum senĉesa malsano en la maljunaĝo. Kiam mi estis eble dekkvar-, dekkvin-jara, mi vizitadis lin en stukista laborejo sub Bělka, kie li laboris, kaj mi provis skulpti.

La malnova Vyšehrad… kaj la akvolaborista Podskalí – Subrokejo… kie, laŭ mia panjo, infanoj naskiĝadis sur ŝovelilon de tombfosisto…

Vivis tie familioj de francaj elmigrintoj post la Granda franca revolucio, ekzemple la familio Burget, sed ili vivis tie jam tiom longe, ke Subrokejo estis jam longe ilia hejmo. La subrokanoj grandparte flosigis lignon sur Vultavo de Ŝumavo ĝis Prago kaj pluen, vintre ili fosis glacion el Vultavo kaj disveturigis ĝin en buĉejojn kaj en gastejojn, ĉar glaciŝrankojn ankoraŭ neniu fabrikis, iuj fiŝkaptis, sed vivrimedoj estis malpli multaj ol homoj, kiuj ofte havis mizeron. En unu familio de Vyšehrad estis infanoj mortantaj deok-jaraj, mortigis ilin gorĝoftizo. Por enterigo de unu iris plua infano jam kun bandaĝita kolo, rakontis panjo. La avino helpis, kie ŝi povis, kion la avo ne fortrinkis, tion ŝi disdonis. Ĝi estis vana am-klopodo.

La rememorojn pri la tiamaj flosistoj, glaciistoj, ŝipistoj ĉiuspecaj konservas la ĉarme kostumata societo Vultavanoj. Lime de la 19-a kaj 20-a jarcentoj Vultavo estis reguligita. Ĝis tiam ĉiujare ĝi inundis Subrokejon. La komunikiĝon inter Vyšehrad kaj Podolí prizorgis primisto, nur dum la reguligo enpenetris en la sanktan rokon de Vyšehrad tunelo. Nuntempe ĝi devus esti multe pli larĝa, ĝi ne sufiĉas por la trafiko. Ankaŭ al Smíchov trafikis pramoj.

En la tempo, kiun mi memoras, ni loĝis en la supra parto de la Vratislavova-strato. Mia naskiĝdomo estas verko de la konstruesto Hodek. Ĝi estas anguldomo, malsupre sub ĝi en Neklanova-strato estas domo kubisma, elstara konstru-memorindaĵo.

En la kubisma stilo estiĝis tuj post la reguligo de Vultavo la vilaa kajo ekde la tunelo ĝis la Fervoja ponto.

Subrokejo la perdon de la libera vultava bordo priploris kaj poste ree prifestis. Post la fino de la reguligo estiĝis teatraĵo, verkis kaj reĝisoris ĝin Popelka Biliánová. Mia panjo en tiu teatraĵo rolis niksidon. Popelka-n Biliánová konis ankoraŭ ankaŭ mi, ŝajnas al mi, ke ŝi estis malgranda globforma maljunulino kun fajfsona voĉo. Ŝi mortis en sia dometo en la Citadelo en la jaro 1941. Vidalvide staras la Origina domo de la Jedlička-instituto, fondita en 1913. Tiam panjo estis 12-jara. Ĝis la fondiĝo de la instituto ĝi estis Ludvo, oni nomis ĝin mi ne scias kial Pollando. Sub la dometo de Popelka Biliánová estas etap laceto, kiu finiĝas per dometo, konstruita perpendikle al la strato En la Citadelo. Iam estis en ĝi tabakvendejo. Post pulmito paĉjo tuj dekutimiĝis fumi. En la dua mondmilito ni jam interŝanĝadis lian porciumon da cigaredoj ĉe bakisto por pano.

Dum la dua mondmilito malaperis el nia hejmo ĉiuj valoraĵoj, interŝanĝeblaj por manĝaĵo. La ora horloĝo de paĉjo, la ringo de panjo, ankaŭ la nuptoringoj, la facetita vazo. En manĝaĵon transformiĝis ankaŭ la tuta laborenspezo de panjo. Panjo ellernis la metion de kudristino, sed ŝi utiligis tion, escepte de la militjaroj, nur hejme, ŝi kudris por si kaj por mi. Ŝi ellernigis min kudri. Ĉiuj miaj „modeloj“ estis de hejma origino, adoleskante mi ellernis miajn robojn projekti, desegni tajloŝablonojn kaj ankaŭ tajli. Mi fuŝis nur unu kaj ne tute, ĝin eblis ripari. Mi scipovis baldaŭ maŝinkudri, sed panjo longe havis kunkudrojn pli rektajn, ŝi longe prizorgis ĉion pluan permaŝine kaj permane, ĝis poste per malpli fortaj okuloj ŝi malfacile tredis fadenon, kaj tiam kunkudradis vestojn por sia kuzino la laboranta kudristino Slávka, ŝi elprovis, kaj panjo poste ĉirkaŭfadenigis. La kudromaŝinoj tiam ankoraŭ ne finpretigis la kudraĵon, almenaŭ la nia, kaj la manlaboro estas eĉ pli fajna. Sed en la dua mondmilito, kiam en urboj estis mizero, panjo kudris enspezcele, el restaĵoj kaj fortranĉaĵoj ŝi faris infanludilojn por la vendejo de sia labordonantino. En tiu tempo mi ellernis kudri gantpupojn, mi kudris ilin en la grupo de Josef Pehr. Panjo ne labor-registriĝis kaj tial maljunaĝe ŝi ricevis nur la edzinan pension 240 kronojn monate. Dume ŝi laboris pli ol plejparto de dungitoj. Tiutempe estis kutimo, ke daŭre dungata estis nur viro, la kapo de la familio.

El la unua mondmilito paĉjo revenis pli poste, tial la renverson de 1918 en Prago li ne festis. Sed li estis same fervora patrioto kiel panjo. Ili transigis sur min siam entuziasmon por la unua respubliko kaj por prezidento Masaryk. Antaŭ la dua milito la gepatroj dediĉis ĉion, kion ili dum la geedzeco ŝparis, por la defendo de la ŝtato En la jaro 1938 dum la mobilizo paĉjo soldatiĝis kiel la plej olda aĝogrupo. Mi sendadis al li al Mimoň, kie lia taĉmento kantonmentis, leterojn pleněn de kuraĝigaj frazoj. Dum ilia skribado mi ploris…

Mi skribas hazardpense, mi ne scias, ĉu eblas tion vicigi en unuopajn jarojn, mi travivis jarindikojn multajn, multajn renversajn. Unu mia poseto nomiĝas Sep renversoj. Ĝi finiĝas iel tiel: Korvoj en falspiraloj ĵetas sin al abismaj trairejoj de renversoj.

Laŭ vidpunkto de miaj samaĝuloj ili devus esti sep nur en la jaro 2004, se ni kalkulas en renversojn la eniron en Eŭropan Union, sed mi antaŭ menciis tiun, kiun ni heredis post la plej proksima antaŭa generacio. Ĝi estas nia renverso fundamenta kaj kune kun la venka fino de la dua mondmilito la plej bela. Sep niajn renversojn menciis antaŭ nelonge ankaŭ samklasano el altlernejo, mi nur ne scias, ĉu ni ne estas maltrafantaj. En jarindikoj por mi tio estas la jaroj 1918, 1938, 1939, 1945, 1948, 1968, 1989. La jaro 2004 estas oka. Ĉiu ĉi renverso estas alia, miaopinie ili kunkune elreligis la ĉeĥan nacion tiel, ke ni ne povas miri pri la malordoj.

Kun la escepto de la heredita entuziasmo por la unua respubliko la pli vastan eŭropan situacion de la ĉeĥa medio mi komencis konscii ĉe la morto de prezidento Masaryk. Mi estis dekkvarjara kaj la eventon mi sentis kiel vundon. Esprimas tion la akordo de Suk el la Fabelo pri Raduzo kaj Mahulena, la ĉeĥa muziksento ĝin por tiu momento precize elektis. Kiam ajn mi tiun akordon aŭdas, ĉiam mi rememoros… Ĝis tiu momento mi travivis neniun malbonan, fatalan intervenon en la vivon de mia nacio.

Praha-ek-2005-03-07

Sed personaj malfacilaj travivaĵoj jam estis kelkaj, ĉion mi travivadis tre abrupto, eble panjo transigis sur min sian nervan konstituon. Ŝi havis malmulte da propra volo, ŝi estis cedema la la patro, kiu estis tre justama, tamen mi pensas, ke konvenus al ŝi pli granda memstareco. Ŝi peze spertis la morton de siaj fratoj, la transloĝiĝo al Krč estis por ŝi nevola ŝiriĝo de gracilaj fadenetoj, per kiuj ligis ŝin dum la tuta vivo la malnova Vyšehrad.

Nur laŭ malmultaj vidpunktoj panjo liberigis sin el la influo de sia naskiĝloko. En io tamen. En la komenco de la jarcento estis la tuta subkastela domaro influita de la kapitulo de Vyšehrad. Oni partoprenis procesiojn kun antaŭkantantoj, ekzemple al la Sankta Monto. La malgranda Mildička kompreneble ankaŭ. Sur la ŝtuparo oni grimpis tie surgenue. La malgranda Mildička kompreneble ankaŭ. Oni aĉetadis oferaĵojn, Mildička ŝparis por granda koro, por ke la avino, turmentata de sorto, resaniĝu. Longe ŝi preĝis, ĉiuj jam foriris, Mildička genuanta en la benko ne estis videbla, kiel ŝi estis klinita. Interrompis ŝian preĝadon la alveno de la loka preĝejservisto, aŭ eble eĉ de monaĥo. Li formetis ĉiujn vaksoferaĵojn en korbon, Mildička postsekvis lin por vidi, kion li faros kun ili. Li forportis ilin al standistoj, evidente por nova vendo. Certe tion pastroj klarigus per sobola dediĉo de la oferaĵoj al Maria la Virgulino, sed tion la reala penskapablo de la infano bonŝance ne atingis, kaj tial el Mildička fariĝis dubanto pri la sankta eklezio katolika. Sed alimaniere forŝiri panjon de Vyšehrad paĉjo ne sukcesis.

La loĝejon en Krč trovis paĉjo, sed dum la vojaĝoj al Vyšehrad panjo rimarkis, ke proksime de la tria pordego de Vyšehrad en la domo Ĉe Atloj kreskas surkonstruaĵo. Kaj tiel panjo liberigis ĉiujn luantojn de la sinjoro dom-posedanto „kiu estas ĉi tie mastro“, ĉiuj samtempe forloĝiĝis.

En Krč naskiĝis mia fratino Jarmila, sed panjo igis enskribi, ke ŝi naskiĝis en Vyšehrad kiel mi. Mia baptopatrino estis la onklino Božena, kaj panjo rakontis, kiel ŝi timis, ke ŝi volos, ke mi nomiĝu laŭ ŝi. Sed la onklino lasis la elekton de mia nomo al panjo. Kiam mi fariĝis adoranto de Božena Němcová, mi bedaŭris, ke mi ne estas Bonjo. Por Jarmila estis baptopatrino la fraŭlino Jarmila Švejkovská, kaj tiam panjo ĝojis, ke la knabino nomiĝas laŭ ŝi. La baptopatrino eĉ elpensis la kromnomo enradikiĝis.

Šamílek foje perdiĝis. Pri ni ambaŭ zorgis paĉjo en la ĝardeno, ŝi el la ĝardeno malaperis. Serĉis ŝin ĉiuj ĝardenistoj kiel perlon inter ŝtonoj. Šamílek nenie. Mi havis ideon rigardi de sur la muregoj, de kie estis videbla nia balkoneto en la unua etaĝo de la vratislavova-strata anguldomo. Kaj kiun mi tie vidas kiel Šamílek-on. Ŝi estis apenaŭ triéra, ŝi trairis la Brikan pordegon, tra iom da Vratislavova-strato kaj malantaŭ la pordo de la konata loĝejo ŝi laŭdire vokis:

„Frapu!“

En la ĝardenetoj Šamílek eminentiĝis ankoraŭfoje. En la korto, kie estis diversaj kortbirdoj, al ŝi kaj al la malgranda Mirek ekplaĉis kokinaj ekskrementoj tiom, ke ili per ili „pentlis poldeton“. Per baroneto ili ŝmiris ilin sur la pordo de ŝedo. Tio estis en varmega somero, ambaŭ patroj la infanoj naŭzoplene senvestigis kaj verŝis sur ilin la karanan akvon el korta hidranto.

Lernejon mi komencis vizitadi el la loĝejo Ĉe Atloj, kie en lasta loĝejo en la surkonstruaĵo ni havis belegan rigardon al Hradčany el kuirejo kaj el ĉambro al Barrandov. Ankaŭ la malgranda fenestreto en koridoro, ĉe kiu mi ludadis kun Jarka, celis al Hradčany. El ni naskiĝis patriotoj. Jarka estis sana forta samklasanino kaj ŝi vizitadis min ankaŭ kiam mi malsanis. Ŝi havis onklon, kiu estis sufiĉe pli juna ol ŝi, ŝi devis zorgi pri li kaj kiam li ne obeis, ŝi scipovis obeigi lin. Plua mia kapradino el apuda domo estis la eminentulino Milena.

Ŝi iom ĵaluzis, ĉar ĉe ĉiuj instruistinoj, kiujn ni havis en la unuagrada lernejo, mi estis ŝatata infano, kio ĝuste devis ne okazi. Mia pozicio en la klaso estis ankaŭ alimaniere iom aparta, ĉar ĉe tiu privilegio kaj diference de aliaj eminentulinoj mi ne estis malŝatata de „malpli bonaj“ lernantinoj.

Certe ne pro miaj brunaj okuloj, sed pro tio, ke mi havis por paŭzomanĝo almenaŭ kvin bulkou, kaj nu runu estis destinita por mi, la ceteraj por malriĉaj samklasaninoj. Foje unu el ili svenis pro malsato kaj mi ne estis kvietigebla, tial panjo provizis min.

Eble min ĉiuj samklasaninoj favorit ankaŭ pro tio, ke tuj post mia eniro en la lernejon mi kaŭzis komikan historieton. Tuj antaŭ mia eniro en la lernejon mi ricevis skarlatinon, la klasĉambro sekve ne devis esti desinfektita, kaj nur mi eniris en la lernejon je ses semajnoj malfrue.

Sinjorino instruistino Froňková sidigis min en benkon, sed mi ne restis sidi en ĝi. Mi promenas tra la klasem, rigardas bildojn sur vandoj, jen kaj jen mi ĝenas samklasaninojn per ia demando, mi ne perceptas, ke la instruistino observas min. Ĝis kiam ŝi alvokis min al si:

„Venu al mi, vi mihulino."

Trankvile mi iras, mi haltas ĉe la podio. Kaj tiam mi ĝentile salutas. Sed kiel. Serioze mi diris „Mian respekton", kiel mi kutimis komenci paroli en butiko. La tuta klaso ekridis. Sinjorino instruistino ankaŭ ridis, mi ekmienis ploronte, estis evidente, ke ili mokas min.

„Manjo," alvokis la instruistino Manjon Málková el la unua benko. „Venu montri, kiel oni salutas en lernejo!"

Manjo rektiĝis kiel liniilo, rompiĝis en la talio, kliniĝis kaj rektiĝis. Kaj iris sididgi sin.

La klaso jam streĉite silentis. Mi brulis kiel peonio kaj sur la vangoj ruliĝis testudaj larmoj. Sinjorino instruistino leviĝis, sidigis min sur la sinon kaj diris:

„Ne ploru, antaŭ nelonge la ceteraj knabinoj ankaŭ ne sciis, kiel oni en la lernejo ĉe la podio salutas."

Kaj ŝi ekridetis al mi tiel, ke mi vidis en ŝi bonan feinon kaj la ploro pasis.

Sed la instruistino ne havis ĝuste sveltan station de feino, ŝi estis pufala, ĝis nun mi memoras ŝian molan ĉirkaŭbrakon, ĉar ŝi min ĉe sia rakontado ĉiam tenis en la sino, por ke mi eble ne vagu tra la klasejo. Ŝi invitadis min kun panjo en sian loĝejon kaj lasis min tie kuri, ŝi eĉ instigis min al tio. Kun la edzo ŝi ne havis infanojn, amuzis ilin mia scivolemo. Mi estis malkvieta kreaĵo, jam pro la petolemo kaj distriĝemo mi povus fiaski ĉe severa instruistino, precipe kiam la gepatroj ne instruis min, ke mi en la lernejo estu atentema. Nur pro propra scivolemo mi esplortrovis, kiu litero estas kiu, sed eĉ silabumi mi ne scipovis. Tion mi ellernis nur en la lernejo.

Al mia unua lerneja Kristnasko mi ricevis sub la aceton Avinjon de Božena Němcová kaj Lampiretojn de Karafiát. Tiam mi jam posedis iom da lernejaj scioj. Mi tralegis ambaŭ librojn dum la kristnaska libertempo kaj la lampiretojn kaj avinjon mi tiom korŝire priploris, ke panjo ĵetis rigardon al paĉjo kaj bedaŭris:

„Jesueto ne devis doni al ŝi ĝuste tion, li devis donaci al ŝi Rulpizeton."

Nu jam okazis. Mi kontraŭe postulis ian daŭrigon de Avinjo. Barunka ne mortis, la ceteraj infanoj ankaŭ ne, do kia estis la daŭrigo de la rakonto. Paĉjo momenton pripensis, poste li elprenis el libroŝranko la unuan volumon de F. L. Věk de Jirásek kun ilustraĵoj de Adolf Kašpar, li montris ilin al mi kaj diris:

„Mi Pontus al vi tiun ĉi grandan libron, sed vi devus ĉe la legado sidi ĉe tablo bele rekte, ne kurbiĝi al ĝi."

Ke mi devas ĉe legado havi lavitajn manojn, mi jam sciis. Pri ĉiuj kondiĉoj mi konsentis.

„De la komenco temas pri malgranda bubo, sed poste li elkrekreskos. Nu kaj kiam tio tedos vin," daŭrigis paĉjo, „mi donos al vi ion alian."

Se mi enprofundiĝis en legadon de F. L. Věk, mi legis kaj legis, ĝis mi tralegis ĉiujn kvin ampleksajn volumen. Mi nur ofte ĝenis postulante klarigojn. Kaj paĉjo klarigis tute volonte. Li prenis min en Klementinumon, tiel mi troviĝis tie, kie nun estas la Nacia biblioteko, kaj ke en la tempo de la malgranda Franĉjo Věk estis monaĥejo kaj li studis en ĝi.

Mi notis en mia memoro ankaŭ aliajn konstru-memoraĵojn de Prago, aŭ mi eksciis, kie ili troviĝis.

Sed kio okazi sen la lernejo. Neatendite min instruistino Froňková gvidis en kvinan klason. Tie ŝi diris al lernantino, ke ŝi malfermu ilian legolibron, ĉe kiu paĝo ŝi volas, kaj donis ĝin al mi.

„Legu," ŝi instigis min.

Kaj poste:

„Tiu ĉi knabineto estas el la unua klaso, ŝi venis en la lernejon pli poste, ĉar ŝi estis longe malsana, kaj kiel ŝi legas. Kaj iuj el vi ankoraŭ nun silabumas."

Mi terure honos.

Panjo venis por peti la instruistinon Froňková, ke ŝi ne demandu min, kiu ion misfaris, ĉar mi devus mensou, ke mi ne scias, ĉar mi ĉiam estis pro tio plorema. Mi ploris ankaŭ pro almozuloj kaj migraj muzikistoj. Ili estis plejparte tirharmonikisto kaj violonisto, ili ludis en kortoj, ankaŭ iam ili kantis, kaj aŭskultantoj ĵetis al ili almozon. Mi bedaŭris ilin, ke ili ne povas vivteni sin alimaniere kaj estas kondamnitaj al tia almozado. Sed nuntempe preskaŭ ĉiu portas sian muzikon en la poŝo

Ankaŭ la direktorino Kliková, kiu instruis nin en la dua klaso, min malĝuste privilegiis. Kaj kiam en la tria klaso ŝin por ia tempo anstataŭis la juna finstudinto de la Instruista instituto Mirko Vořáček, tiu min eĉ portis sur la ŝultroj. De li mi ankaŭ ricevis la unuan laŭdon por literatura „verko". Li rakontis la legendon pri la Daliborka-turo kaj tuj li taskis al ni verki ĝin per propraj vortoj. La kajerojn li alportis korektitajn en la sekvanta leciono kaj diris:

„Kio tre plaĉis al mi, tion mi tralegos al vi."

Kiam li komencis legi, ekfajris miaj oreloj, ĝi estis mia skribaĵaĉo.

Milena havis belegan skribmanieron diference de mi, kaj ŝi tuj enkapigis tion al mi.

„Se vi prefere kapablus skribi tiel bele kiel mi."

Tio min iom ĉagrenis, sed ne multe. Kun Milena mi amikis ĝis ŝia antaŭnelonga morto, ŝi fariĝis sukcesa inĝenierino.

Alian sukceson mi travivis ankaŭ ankoraŭ en la unuagrada lernejo, en la kvara klaso de la instruistino Taliánová. Kiel hejmtaskon mi skribis por la dekkvina datreveno de la respubliko poemeton:

Ni jam ĝojas pro libero dek kvin jarojn,
do dum tempo ne tro longa,
sed sufiĉas, ke l´ patrujo estas nia panjo
kaj nacio nia spertu pluajn pacajn farojn.

Mi legis ĝin poste sur la podio. Paĉjo provizis min per la verkoj de Sládek, Vrchlický kaj aliaj facile kompreneblaj poetoj, ili servis al mi kiel modelo, sed la enhavo de la poemo estis autonoma.

Tio estis en la jaro de la enpotenciĝo de Hitler 1933. Tiam mi ne sciis, kiom granda malfeliĉo ĝi estis por ni.

Ankaŭ aliel mi havis sufiĉe da malbonŝanco. Mortis la je du jaroj pli juna fratino de Milena, mia samnomulino. Mi amis ŝin eĉ pli multe ol Milenan, ĉar ŝi estis simila ekscesanto kiel mi ĵaluzis, kaj sekve ŝi eĉ ne fanfaronis kontraŭ mi. Por memorigaĵo pri ŝi ŝia patrino donis al mi malgrandan libreton de ŝiaj fabeloj, mi havas ĝin ĝis nun.

Mi estis iom stulte trosentema. Foje mi iris kun la eta Jarmila en la pupteatron de Sokol de Vyšehrad sur la muregoj. Kiam su a scenejo aperis diabloj, ni ambaŭ leviĝis kaj fuĝis.

„Kien, kien, vi ja ne timus," strebis la fratoj sokoloj haltigi nin.

Sed ni tro kunsentis kun la endanĝerigitaj lignaj aktoroj.

(Daŭrigota) (Tradukis Jiří Patera)

Jiří Karen

Sonorilego – Sonoriloj – Sonoriletoj

Glore kaj honore sonorilego sonis
ĝis trans la horizonto
La tutan urban genton ĝi vekis
nin instruante diveni
de kie povus la malbeno veni

La sonorilojn oni pendigis saĝe
super dom-enirejon
„Bim-bam – ni rifuzas ĉiujn
kies intencoj malbonas“
Tiel bele kaj hele ili parolis

Ekzistis ankaŭ sonoriletoj
Nur kun ŝnuro ili havis aŭdilon
Jes Mi forgesis… vi foriris…
malaperis reen – kia teruro -
samkiel blua gluto en la inkujon

Jam neniam sonigos
mian telefonon
sonorileto kun voĉo via

Paŝoj

Irante matene tra aleo
ilin – la paŝojn – aŭdas oreloj
Egajn paŝojn energiajn de viroj
Teneretajn de inoj
En ambaŭ elektraj frapoj

Iu vin preterpasis
Kiel ombro en nebulon fatan
malaperis … Tiel klopode
kaj senkonsole li sin
antaŭenŝovis

Por momento rerigardinte
vi scias tuj – tiamaniere
iradas nur perdintoj
el kies koro tristo kaj angoro
ĉian helan rabis
kvazaŭ lastan moneron
el monuj´

Jes li estas
homo kiu el la hejmo
nerespondece
malproksimiĝas

Lasta deziro

Al Eva Seemannová

Suno musline klara
paŝon post paŝo subiras
Niaj deziroj al folioj similas
Fatale neĝas teren
kaj tamen helan mondon vidi
ni aspiris
Al amantoj mi deziras la lunlumon
Freŝan aeron por pulmoj
Al musoj sekuran truon
Niaj aŭtomobiloj bonodoru
kiel herbejaj floroj

Kaj vi – mi deziras laste –
venu min viziti senprokraste
al malsanulej´ por diri al mi
almenaŭ unu el afablaj vortoj
kiuj centkvante kaj milde

multaj dirontas
antaŭ mia
entombigo

Amantoj iam kaj hodiaŭ

Ne miru
vidante ilin iri malproksimen
ĝis la Luno
por unu dolĉa vinberaro
kiu sur la stelbranĉaro fajretas

Ni tiam nur bonmore
antaŭ la pordegoj
de l´ gepatra domo staris
pri la vetero kaj rikolto parolis

kaj ke nia paĉjo
en milito mortis
kaj la patrino ege

Pri hasta rapideco

Bruege kaj malodorante
sur ŝose-asfalto senhalte
al diablo simila
veturante siblas
Pro gas-nebulo
nenia regiono vidiĝas

El sub aŭtomobilaj radoj
kok-flugiloj
anser-piedoj forfluetas

Li devas ĉiam rapidi
la unua antaŭeniri
al ĉiuj elstare pioniri

Li la fiero de kamaradoj
de nia klano klubo gento
por laŭra gloro
por arĝento
memplaĉe kaj vante
fiere sin mem admirante
tien li celas

kie jam multaj
kviete kaj poreterne loĝas

Al tombejo

(Eternaj Revuloj)

Čestmír Vidman

P. F. 2002

Vi envias al birdoj
Ili scias flugi
Ili ne konas dentodoloron
Ili ne havas varikojn

Sed tiu dura lukto
kun sanga plumaro
por ioma varmo
por transvivi

Tamen ili kantas
Ne enviu
Kantu
kiel birdoj

P. F. 2003

Ikaro
firmigu flugilojn
por atingi
la celon

Salutu
alaŭdetojn
Feliĉan revenon
frato

P. F. 2004

Ankoraŭ multajn sunelirojn
al kunterloĝantoj

Ĉe mi jam dominas nokto

Mi tamen ne rezignas

Eĉ blinda formiko
batalas kontraŭ herbotigoj

Ĉion bonan al vi
Universanoj

Věra Ludíková

Papilia efiko

En la jaro 2002 publikigis la ĉeĥa poetino Věra Ludíková en Literární noviny (Literatura gazeto) sian unuan alvokon de la projekto „Sendu ĝin pluen“. Diversaj personuloj verkas siajn mesaĝojn al la Universo. Pri la jam preta tria libro skribis la poetino en Literární noviny n-ro 28 jenon:

„Se vi havus jam malmulte da tempo, nur kelkajn momentojn, se restus al vi eĉ la lasta spiro, kion vi sendus en Kosmon?“ Tiel komenciĝis la unua alvoko Sendu ĝin pluen, ĝenerala, tradukita ne nur en anglan, hispanan, germanan, rusan kaj esperanton, sed ankaŭ en la japanan, ĉinan, oroman, hungaran, polan, slovakan kaj latinon. Komenciĝis ĝia mirado al diversaj personuloj literaturaj, sciencaj kaj ankaŭ al vidartistoj, kiuj poste kontribuis en la tri samnomaj libroj.

La kontribuaĵo de Jiří Stránský, la prezidanto de la PEN-klubo, apelacie eldiras: „Mi havas unu grandan deziron: ke kiel plej frue estu notita ĉio, kio en nia lando okazis dum la regado de la komunista partio Por ke tio samtempe fariĝu enskribo en la historion de nia ŝtato dokumentanta, ke eĉ en la tempo de la plej granda mallibereco, de la plej granda subpremado kaj de la plej granda humiligo miloj da viroj kaj virinoj (el kiuj multaj nur finis sian infanaĝon) kapablis rezisti. Kaj ĝuste tio estas nia mesaĝo – la mesaĝo de 270 000 politikaj malliberuloj de la komunismo.“

Ankaŭ la alia alvoko celis en Kosmon. La libron Sendu ĝin pluen II. mi prezentis jene: „Se vi volas helpi, vi devas pardoni, kaj nome komplete! Kiel nova konstruata templo estas la serĉado kaj fortigado de spiritaj valoroj. Sur kiaj pli bonaj fundamentoj tiel fari ol sur la amikeco, sur la ĉioĉirkaŭprenanta amo kaj pardono. Laŭ Albert Einstein, la plej belan kaj la plej profundan senton ni povas observi en perceptado de mistikaĵoj. Tio estas la gardoturo de la aŭtentika science. Tiu, al kiu estas tiu ĉi perceptado fremda, kiu ne plu estas kapabla miri kaj esti ravita, estas verdire morta. Jam hodiaŭ estas en la homa genomo enskribitaj tiaj valoroj, kia estas ekzemple la altruismo. Iam tiam ili estas rekoneblaj ĉe homoj, kiuj kiel la unuaj, kiel la lumportantoj estas sur sia spirita vojo je iom pli antaŭe, je granda parto antaŭe.“

La dua alvoko estis tradukita plie en la mongolan, araban kaj ankaŭ en la evean (Togolando) pere de esperanto, eĉ en la tibetan kaj en tiu ĉi lingvo estas notita fragmento el la elpaŝo de la tibeta dalailamao: „Dum ekzistos la Universo, dum ekzistos suferado de sentantaj estaĵoj, estos ankaŭ mi, por ke mi povu servi a lili.“

D-ro Peter Lipták, la prezidanto de Komunumo de slovakoj, skribis: „Kun la amo, timo kaj kredo je saĝo de nepoj de niaj nepoj mi testamentas al la estontaj epokoj kaj al ĉiuj homoj sur la Tero kaj la Universo. Super ĉio gardu la infanan rideton, gardu la bluan ĉielon super la infanaj ludoj, gardu la varmon de infanaj heroj.“

PhDr. Marta Foučková mesaĝas: „Mia mesaĝo estas gvidata de deziro levi la konscion pri la ĝusta senco de la surtera vivo. Ekkonscii pri la respondeco por ni kaj por la estuloj, kiuj troviĝas ĉirkaŭ ni kaj por kiuj ni portas la respondecon de niaj decidoj.

Kiel nacio ni havas antaŭ ni grandajn taskojn, por kiuj ni estas preparataj dum longaj jarcentoj.“

Miroslav Vejlupek citas Ivanon M. Havel, kiu nomis la universalan konflikton de la tempo plej klare: „Klerulo, kiu ne interesiĝas pri aferoj je mejlí malproksimaj de lia klereco, rapide ŝanĝiĝas je malklerulo. La mejloj estas ja supozataj.“

Miloslav Fiala, la prezidanto de Unio de Ĉeĥa Katolika Karitato, skribis: „Ŝajnas, kvazaŭ la ĝenerala degenerado progresis tiom, ke la materiaj kaj ankaŭ spiritaj atomoj teniĝas kune nur per la influo de lastaj restoj de la origina ordo. Sed ankaŭ la malgrandaj kaj ŝajne senhelpaj homoj povas kaj devas diri la kuraĝan „jes“ al la sendube malrapida, tamen principa transformo de nia modno. Pruvas tion ekzemple ankaŭ la sperto pri la „papilia efiko“, kiun sciencistoj malkovris antaŭ 40 jaroj, kiam ili trovis, ke en la t. n. ĥaosaj sistemoj – kaj la homa socio inter ilin apartenas – sufiĉas eta ŝanĝo de malgrandaj valoroj, kaj la tuta sistemo komencas paŝi en alia direkt.“

Granda favoranto de la tuta projekto Sendu ĝin pluen estis la antaŭ nelonge mortinta prof. PhDr. Zdeněk Matějček, CSc. En Eseo pri ĝojo li skribis: „La komuna ĝojo kunligas – dum la komuna zorgo ne.. Tial mi ĉiumomente klarigas al gepatroj, ke estas bone, kiam ili kun la infanoj faras kion ajn, kio alportas komunan ĝojon, distraĵon, kontenton. Komuna zorgo kontraŭe pli ofte separas kaj disigas, ol kunligas kaj kunlaborigas. Ekzemplo estas la infanoj kun grava mentala tardo – tiuj divorcigas la gepatrojn plej ofte.“ Refoje profesoro Matějček per sia afabla maniero prezentis siajn kontribuaĵojn en aŭtoraj legadoj, li disdonadis ĝojon, eĉ kiam li estis jam serioze malsana.

